Koloseo

La Koloseo, origina Flavia Amfiteatro, estas kolosa amfiteatro en Romo, kies restaĵoj konserviĝis.

La teatro havis lokon por 45 000 spektantoj kaj estis destinita al cirkaj ludoj (latine: *circenses*). Ĝia konstruado estis komencita sub imperiestro Vespasiano ĉirkaŭ 70 kaj kompletigita de ties filo Domiciano en la 80-aj jaroj. Estas hipotezoj, ke la konstruado estis pagita per la konkeraĵo el la milito kontraŭ Jerusalemo. La teatro estis konstruita ĉe la granda palaco de Nerono (latine *Domus Aurea* = ora domo), konstruita post la granda incendio de 64; proksime staris kolosa statuo de Nerono, de kiu eble deriviĝas la nomo.

La Koloseo estis en uzo ĝis 217, kiam ĝin trafis fulmo, kaŭzanta incendion. En 238 ĝi estis restaŭrita kaj poste, ĝis 524, uzata por diversaj celoj, precipe cirka bestoĉasado (*venatio*). En 874 tertremo damaĝis ĝin, kaj oni transformis ĝin al fortikaĵo. La marmoro, kiu kovris ĝiajn murojn, estis bruligita por produkti kalkon. Dum renesanco kaj baroko la regantaj familioj de Romo (el kiuj devenis multaj papoj) ĝin uzis kiel fonton de marmoro por la konstruado de la Baziliko de Sankta Petro kaj siaj privataj palacoj. Konata priskribo de tiu praktiko estas la latina vortludo *Quod non fecerunt Barbari, fecerunt Barberini* (kion ne faris la barbaroj, faris la Barberinoj, unu el tiuj familioj).

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Koloseo_(Romo)